

# Argentina E-Vento

Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo  
13-a jaro n-ro 32  
jan / mar 2008 [1]

## Argentina Esperanto-Lernejo: leĝe registrita

  
*Ministerio de Justicia  
y Derechos Humanos  
Inspección General de Justicia*

BUENOS AIRES, 11 DIC 2007

**VISTO:** el expediente C N° 1742159/40597, en el cual se solicita autorización para funcionar con carácter de persona jurídica a la: "ASOCIACIÓN CIVIL ESCUELA ARGENTINA DE LA LENGUA INTERNACIONAL ESPERANTO"

**CONSIDERANDO:**

Que la entidad satisface los requerimientos establecidos por el Artículo 33, 2da. parte, Inciso 1° del Código Civil.

Que la presente encuadra en las facultades conferidas a la señora Inspectora General por los Artículos 10 Inciso a), 21 Inciso a) y concordantes de la Ley N° 22.315.

Por ello,

**LA INSPECTORA GENERAL DE JUSTICIA  
RESUELVE:**

**ARTICULO 1°:** Autorízase para funcionar con carácter de persona jurídica a la entidad denominada: "ASOCIACIÓN CIVIL ESCUELA ARGENTINA DE LA LENGUA INTERNACIONAL ESPERANTO", constituida el 20/02/2004 y apruébase su estatuto de fojas: 1, 13, 35/36 y 82/89.

**ARTICULO 2°:** Regístrese, notifíquese y expídase testimonio de fs. 7, 18, 90/97 y 98/99.


La entidad deberá dar cumplimiento a los artículos 372 y 373 del Anexo "A" de la resolución I.O.J. 7/2005 (rúbrica de libros).

Oportunamente, archívese.

**RESOLUCIÓN I.G.J. N° 001067**



Argentina Esperanto-Ligo  
informas,  
ke la nova  
ARGENTINA  
ESPERANTO-LERNEJO  
kreita de nia Ligo,  
estas oficiale aprobita  
je la ŝtataj juraj instancoj  
laŭ Rezolucio  
IGJ N° 001067/07

La Argentina Esperanto-Movado, havas nun oficialan lernejon  
jure establita por instruado de la lingvo internacia akorde al landaj leĝoj  
kaj povas ricevi financajn subvenciojn.

La Esperanto-Lernejo ekde nun devos klopodi atingi alian revon:  
enkonduki Esperanton en ŝtataj lernejoj.

Argentina E-Ligo en venonta Asembleo proponos la Regularon por la funkciado de la  
Lernejo pri ĉiuj instancoj de la instruado de la lingvo internacia. (Vidu p. 4)

# Argentina E-Vento

13-a jaro n-ro 32 jan / mar 2008 [1]  
Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo  
[Argentina Esperantisto 1917-1995]  
Aperas kvaronjare/*Trimestral*  
Dissendita al 31 landoj - Interŝanĝo dezirata

## Redaktoro -ekde 1996-

Rubén T. Diaconu Tkachenco  
Calles 119 y 122  
AR-H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña, Chaco  
Argentino  
rubendiaconu@yahoo.com.ar

## Kunlaborantoj:

Rubén Sánchez: esperanto@neunet.com.ar  
Emmanuel Maggiori:  
emmanuelmaggiori@gmail.com

*Pri la subskribitaj artikoloj respondecas  
iliaj aŭtoroj kaj ili ne nepre reflektas la  
opinion de AEL aŭ de la redaktoro.*

## Argentina Esperanto-Ligo

Fondita la 12-an de aprilo 1941  
Re-fondita surbaze de AEL-AEA  
la 9-an de decembro 1995  
TTT-ejo: [www.esperanto.org.ar](http://www.esperanto.org.ar)

## AEL-Estraro

Alcides P. Wentinck: *prezidanto*  
René Arce: *vicprezidanto*  
Jorge E. Cabrera: *sekretario*  
Fernando Inocencio: *vicsekretario*  
Jorge Cabrera – *kasisto*  
vakas – *vickasisto*

## Komisiitoj

*Instruado:* vakas  
*Libroservo:* Jorge Cabrera  
*Disvastigado:* Silvia Rottenberg  
*Arĥivo:* Roberto Sartor  
*UEA-Komitatano A:* vakas  
*Kotizperanto, p/AEL –*  
*UEA-Ĉef-delegito:* Rubén L. Sánchez  
*Komitatano A de TEJO:* Cecilia Prudkin  
*Argent-EJO:* Daniel M. Lucero

# Enhavo

## E-Lernejo, (foto de Rezolucio)

.....sur kovrilpaĝo

El la Redaktejo..... 2

Análisis / Noticias /  
*Hispanlingva rubriko*..... 3

Tra la lando..... 5

Amerike ..... 6

Internacie ..... 7

Anoncoj / Dankesperimoj..... 11

Distraĵo ..... 12

# El la Redaktejo



## Karaj legantoj:

Tutcerte la jaro 2008 komencis por ni kun tre bona novaĵo, t.e. oficialigo de la Argentina Esperanto-Lernejo kaj alia tre malĝoja pri la forpaso de d-ro Casartelli. En sekvanta numero ni rakontos pli pri la historio de la instruado en Argentino. Bonan legadon.

*Via redaktoro*

# Argentina E-Vento

Legu la PDF-Version ĉe:  
[www.gazetejo.org/node/651](http://www.gazetejo.org/node/651)

# Novedades del esperanto y su entorno

**AEL y diversas actividades del esperanto han sido reflejados en medios de comunicación de nuestro país y del exterior**

## ■ Día del Esperanto

---

## Los festejos en homenaje a Zamenhof (1859-1917)

### Montevideo, Uruguay

El 15 de Diciembre es el Día del Esperanto o "*La Zamenhofa Tago*", o día de Zamenhof, pues el 15 de diciembre de 1859, en Bjalistok, (PL), nació el iniciador del idioma internacional esperanto, el Dr. Lázaro L. Zamenhof. Por tal motivo los esperantistas de todo el mundo festejan ese día, de diferentes maneras.

En el vecino país del Uruguay este año se previeron 3 actividades diferentes.

1) por la mañana en Radio Carve una entrevista a varios miembros de la Sociedad Uruguaya de Esperanto; 2) en la tardecita reunión de confraternidad de esperantistas para dialogar y fijar metas, y como cierre música en esperanto, para los que gustan bailar al ritmo de la música internacional; y 3) durante todo el día Radio Aktiva emitió una emisión especial relativa al día, con mucho material interesantísimo.

### Detalles de las actividades

1.- Sábado 15 de diciembre, hora 9:00 a 10:00: entrevista en Radio Carve. En este caso representado por el sexo femenino, con cuatro miembros de la Sociedad Uruguaya de Esperanto (UES) que se presentaron en Radio Carve para una entrevista en vivo.

2.- Desde las 18hs hasta las 22hs aproximadamente: reunión en la sede de UES, dirección: Vilardebó 1484 (casi Millán) de la ciudad de Montevideo. El programa de la reunión comenzó con un breve balance de lo alcanzado este año, luego se fijaron los objetivos principales para el 2008, se entregó certificados a los alumnos que aprobaron el examen final del curso básico de este año, y luego de un intermedio para un refrigerio, se disfrutó de música de diversos estilos en esperanto, cerrando la noche con un baile. La reunión, como siempre, de "lluvia", (*aclaración: en Argentina "reunión a la canasta", en la que los participantes aportan los comestibles y/o bebidas*).

3.- Emisión especial de *Radio Aktiva*, desde la dirección habitual:

<http://radioaktiva.esperanto.org.uy>

(o directamente del programa favorito para escuchar música, en la dirección:

<http://secure.interuy.com:3220>), con una programación especial en homenaje al Dr. Zamenhof a cargo de Fabiano Henrique, desde Brasil, y se escuchó la voz del propio Zamenhof en uno de los pocos registros existentes. Además, se pudo conocer los entretelones de todo lo que sucedió en Montevideo en 1954 para lograr la declaración de la UNESCO en favor del esperanto. Esto último lo relató el Sr. Barbieri, el esperantista con más años en el Movimiento Uruguayo. Por supuesto, toda la emisión estuvo acompañada de música en esperanto.

*Según informe de: Daniel Bebelacqua, por la Sociedad Uruguaya de Esperanto.*

### Neuquén

El 15 de diciembre, el Círculo Amigos del Esperanto de Neuquén, realizó un

encuentro en la Biblioteca Alberdi, de esa ciudad patagónica. Los motivos del encuentro: la finalización del curso desarrollado en dicha biblioteca y los festejos del **Día del Esperanto**. La temática de la reunión sirvió para analizar las actividades ya realizadas y las futuras a desarrollarse en el 2008. “Debemos mantener en alto la antorcha que nos legara Zamenhof. Esta es la mejor manera de homenajear al creador del esperanto”, dijo el representante del círculo neuquino, Prof. Rubén Sánchez.

## Buenos Aires

Con motivo del **Día del Esperanto**, la Asociación Bonaerense de Esperanto invitó a socios, adherentes y simpatizantes a participar de un encuentro en su sede de la calle Paraguay 2357 de la Ciudad Autónoma de Buenos Aires. El encuentro se realizó el 15 de diciembre a las 18hs. Siendo esta una celebración tan especial para todos nosotros, también fue un momento de reunión muy agradable en un ambiente de fraternidad y franca amistad.- *J. Cabrera*

## Chaco

A pesar de las dificultades meteorológicas, los miembros del Club Saenzpeñense de Esperanto, se reunieron para celebrar el **Día del Esperanto**. El encuentro tuvo lugar en el Club Social de Pres. Roque Sáenz Peña y contó con la grata presencia de Fernando Alcaráz, un joven esperantista de la provincia de Buenos Aires.- *SEK-Bulteno*

## Aniversario

La Asociación Universal de Esperanto (UEA), con sede en Rotterdam, fundada el 28 de abril de 1908, cumple 100 años. Recientemente alcanzó a superar los 6.000 “miembros individuales” en 117 países y más de 11.000 “miembros adherentes” en 67 países, de los cinco continentes.



# La Escuela Argentina de Esperanto: legalmente registrada

**Un sueño que muchos esperantistas argentinos acariciaron por años, hoy es un hecho y una realidad.**

**E**l Ministerio de Justicia y Derechos Humanos a través de la Inspección General de Justicia y por decreto N° 001067, con fecha del 11 de diciembre de 2007, resolvió autorizar para funcionar con carácter de persona jurídica a la entidad denominada Asociación Civil *Escuela Argentina de la Lengua Internacional Esperanto*.

La escuela fue un proyecto que nació de la iniciativa de algunos esperantistas de nuestro movimiento que tiempo atrás presentaron la propuesta a la Liga Argentina de Esperanto. En distintas oportunidades el tema fue motivo de serio debate debido a las diferentes posiciones con respecto al funcionamiento y estructuración de una escuela. Finalmente, en el año 2004, la Asamblea de AEL decidió que la Comisión Directiva llevara a cabo los trámites y gestiones para que la escuela fuese registrada en la Justicia.

En los informes entregados en la Asamblea del pasado octubre de 2007, se aclaró que la escuela “será una entidad dedicada a la enseñanza de la lengua esperanto y a la capacitación de profesores”. Existen en el país distintas entidades que enseñan y capacitan profesionales en música, arte, deportes, y también en idiomas como inglés, francés, portugués, italiano etc. Esta aprobación obtenida le dá a la escuela de esperanto legalidad para desempeñar sus actividades, pero para una total incorporación del esperanto en colegios estatales, la escuela



deberá gestionar también la aprobación del Ministerio de Educación. Mientras tanto, puede otorgar certificados y recibir donaciones o aportes, si así lo ofrecieren particulares o empresas que desearan colaborar con el esperanto.

Según los informes, la escuela no constituirá una competencia, sino un complemento a las actividades de AEL. En la Asamblea de octubre de 2007, se determinó establecer una comisión para estudiar y regular los programas de enseñanza a utilizarse por parte de los profesores que enseñen y entreguen certificados en nombre de la escuela. También podrán enseñar libremente el esperanto todos aquellos que desearan hacerlo independientemente de la escuela.


El estatuto de la escuela presentado consta de 28 artículos, y con algunas modificaciones se tomó del modelo que aprueba el Ministerio de Justicia, la mayoría de los artículos son muy similares a los del estatuto de AEL.

En su Artículo 2 leemos... “Son sus propósitos: a) Organizar en una institución ESCUELA, a todos los "Instructores" y "Profesores", con el apoyo de socios, amigos y simpatizantes del Movimiento Esperantista Argentino, coordinando su acción para difundir y "enseñar" la lengua internacional esperanto, en todo el territorio nacional. b) Preparar nuevos instructores y profesores de esperanto en todos los niveles, para la enseñanza en todos los estamentos dependientes del Ministerio de Educación de la Nación Argentina. c) Siendo el esperanto, la lengua internacional políticamente neutral, recomendada por resoluciones de la UNESCO para su uso mundial como lengua común, su enseñanza y difusión en el país, es realizada por voluntarios como un servicio a una mejor comprensión intercultural e interétnica entre individuos y pueblos de todo el planeta”.

La próxima Asamblea de AEL será sin dudas la mejor oportunidad para coordinar y establecer las modalidades del accionar de la escuela para que esta esté en completa armonía y bajo la supervisión de la Liga Argentina de Esperanto.

*AEL-Secretario: Jorge Cabrera*

## Necrológicas



**Dr.  
Antonio  
Marcelo  
Casartelli  
(1930-2008)**

Nació en Córdoba y siendo joven aprendió esperanto mientras estudiaba medicina en la Universidad Nacional de Córdoba. Luego viajó a Posadas, Misiones, donde durante más de 30 años trabajó en el hospital local llegando a ser su Director.

Como esperantista, fue miembro de UEA y AEL y cofundador de la “Asociación Esperantista de Misiones”, habiendo dado numerosos cursos.

Luego de su jubilación regresó a Córdoba donde continuó con la enseñanza, organizando el primer curso argentino de esperanto por internet mediante el IdEo, Instituto Argentino de Esperanto, que en pocos años logró contabilizar más de cien mil entradas y por el cual el Comité de Evaluación del “Consejo Iberoamericano en Honor a la Calidad Educativa” en sesión ordinaria lo declaró apto para recibir el Máximo Galardón de la Educación, el “PREMIO IBEROAMERICANO EN HONOR A LA EXCELENCIA EDUCATIVA 2007” (*Vea AE-Vento N° 19, pág. 8 y AE-Vento N° 30, pág 3*)

El Dr. Casartelli fue “Komitatano A”, representando al Movimiento Esperantista Argentino ante *Universala Esperanto-Asocio*. Falleció el 26 de diciembre. Nuestras condolencias a sus familiares.

**Prof. Lucy Arce (1943-2008)**, faleció el 15 de enero, esperantista y gran colaboradora de AEL. Tuvo una importante participación en la organización del 2º Seminario de Esperanto, realizado en Buenos Aires, en 1994. Como especialista en la organización de eventos, gracias a su gestión se obtuvo el recinto de la Escuela Nacional N° 1 de Lenguas Vivas, de la calle Paraguay 1950, donde se realizó el Seminario y el que contó con la participación de esperantistas de Argentina y Brasil. Nuestras condolencias a sus familiares.

**Claude Piron (1931-2008)**, estis Honora Membro de UEA, populara Esperanta verkisto kaj pedagogo kaj amata preleganto, forpasis la 22-an de januaro hejme en Gland, Svislando. Li naskiĝis en Namur, Belgio.

Piron laboris kiel tradukisto-protokolisto por Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko 1956-1961 kaj poste por la Monda Organizaĵo pri Sano i.a. en Ĝenevo, Azio kaj Afriko. Trejnita kiel psikanalizisto kaj psikoterapiisto, li komencis praktiki psikoterapion en 1969. Li instruis en la Psikologia kaj Edukscienca Fakto de la Ĝeneva Universitato de 1973 ĝis emeritiĝo en 1994. Poste lia ĉefa aktiveco apud psikoterapia praktikado estis profesie trejni junajn psikoterapiistojn.

Claude Piron esperantistiĝis en 1942 kaj famiĝis ankaŭ kiel unu el la plej elstaraj kaj vervaj pledantoj por Esperanto kiel solvo de la lingva problemo en la internacia komunikado. Krom en Esperanto-aranĝoj, i.a. dufoje en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, li faris sennombrajn prelegojn antaŭ ne-esperantista publiko, i.a. en seminario ĉe Unesko (1986) kaj dum studotago en la Eŭropa Parlamento (1993), kie li traktis la psikologian reziston al la pristudo de lingva komunikado. Li publikigis diverslingve multajn artikolojn pri internacia kaj interkultura komunikado.

Universala Esperanto-Asocio aljuĝis al Claude Piron du el siaj plej gravaj distingoj. En 1994 li ricevis la Premion Onisaburo Deguĉi pro sia kontribuo al la antaŭenigo de internacia amikeco per Esperanto. En 1998 li fariĝis Honora Membro de UEA.

**Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 280**

## Ĝenerala kongresprogramo por la 9-a Meksika Esperanto-Kongreso 2008



*Meksikaj geesperantistoj antaŭ sunpiramido Teotihuakan*

**Tre grava E-programo disvolviĝos en Aguascalientes, MX. Laŭ anoncoj de Meksika E-Instituto, de la 1-a ĝis la 4-a de majo 2008 okazos la 9-a Meksika Esperanto-Kongreso. Jen la programo.**

**Ĵaŭdo, la 1-an de majo**

- 1.- Akcepto de kongresanoj.
- 2.- Registriĝo kaj gastigo de kongresanoj.
- 3.- Interkona vespero kaj hotela noktomanĝo.

**Vendredo, la 2-an de majo**

- 1.- Bonvenon kaj oficiala Malfermo de la Kongreso.
- 2.- Unua prelego.
- 3.- Turisma urbobotirado.

- 4.- Dua prelego.
- 5.- Vizito al Internacia Foiro *San Marcos*.

### Sabato, la 3-an de majo

- 1.- Unua labortempo por kongresanoj kaj kursoj.
- 2.- Konkludoj kaj proponoj.
- 3.- Oficiala MEF-a Kunveno. (nur membroj registritaj) alternaj agoj por ne membroj.
- 4.- Valoto por renoviĝo de la MEF-a Estraro. (nur membroj registritaj) alternaj agoj por ne membroj.
- 5.- Bankedo kaj oficiala prezento de la nova MEF-a Estraro.

### Dimanĉo, la 4-an de majo

- 1.- Oficiala fermo de la 9-a Meksika Esperanto-Kongreso 2008.
- 2.- Promenado en la Urbocentro.
- 3.- Vizito al Muzeo de Esperanto.
- 4.- Vizito al Internacia Foiro *San Marcos*.

### Lundo, la 5-an de majo

- 1.- Ekskurso al la akvokaptaĵo Prezidanto Kajes (Calles) kaj al la insuleto de la tranĉita Kristo.

#### *Vicente Valdes Bejarano*

Meksika Esperanto-Instituto

<http://www.webmei.org/>

Direktoro mailto: [direktoro@webmei.org](mailto:direktoro@webmei.org)

fakso: 52 449 194 4288 (El fremdaj landoj)

01 449 194 4288 (El Meksiko)

kongreskontakto:

[kongreso@webmei.org](mailto:kongreso@webmei.org)

# La ĉijara E-kongreslando

**Nederlando estas la sidejo de  
Universala Esperanto-Asocio kaj  
ĉi-jare estos la lando  
de la Universala Kongreso.**

Situanta ĉe la Norda Maro kaj ĉe la enfluejo de tri grandaj riveroj (Rejno, Mozo kaj Skeldo) estas malgranda, dense loĝata kaj tre evoluinta lando. Pli ol duono de la lando situas sub la marnivelo, pro kio necesas multaj digoj kaj pumpiloj por teni la terenon seka. La Deltolaboroj, kiuj ekestis post la granda inundo en 1953, nun bezonas aktualigon.

En Nederlando loĝas pli ol 16 milionoj da homoj kun tre internacia loĝantaro el pli ol 160 naciecoj. Certe eblas trovi kaj konatiĝi kun multaj kulturoj. La plej densa koncentriĝo de la loĝantaro troviĝas en la okcidento, en urboj: Amsterdamo, Hago, Roterdamo kaj Utreĥto.

Roterdamo ne plu estas la plej granda haveno de la mondo, ĝi tamen estas la plej transithaveno por Eŭropo.

Roterdamo estos la urbo de la 93-a Universala Kongreso de Esperanto de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008. Kaj eble plej interese por esperantistoj, ĝi estas la urbo de la jubila UEA. Kaj oni festos la 100-jariĝon en la centro de nia movado.

*Esperanto, januaro 2008, p. 8*

## Internacie

■ Universala Kongreso





# La astrologia mapo de Zamenhof

Naskita la 15-an de decembro 1859

**L**a unua kontakto, kiun mi havis kun la astrologia mapo de Zamenhof estis en julio 1985, en Belo Horizonte, okaze de la 21-a Brazila Kongreso de Esperanto. En tiu evento samideano Adonis Saliba prelegis pri tiu temo. Kvankam en tiu tempo mi ankoraŭ ne okupiĝis pri astrologio, mi ĉeestis tiun prelegon kaj opiniis ĝin interesa. Tiam mi estis estrarano de Brazila E-Ligo, en Rio, kaj petis al Adonis disponigi la tekston por publikigo en la gazeto *Brazila Esperantisto*. Kaj fakte tio okazis, n-ro 287 (okt-dec/85). Luiz Alberto Martins, tiama redaktoro de la gazeto miapete, publikigis la tekston de tiu prelego.

Jaroj pasis. En 1991 mi komencis okupiĝi pri astrologiaj studoj. En la fino de la naŭdekaj jaroj, samideano Jorge das Neves, invitita de mi, faris prelegon pri astrologio en la sidejo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro, kaj prezentis dum la prelego interalie kiel ekzemplon, la Zamenhofan mapon kun komentarioj.

Estas necese klarigi, ke por prepari iun ajn astrologian mapon oni bezonas tri bazajn informojn: la dato, horo kaj loko de la naskiĝo de iu aŭ io. En la citita prelego de Jorge das Neves li prezentis korektitan naskiĝmapon de Zamenhof, laŭ ŝanĝoj faritaj de Adonis Saliba. En sia prelego de 1985, Adonis Saliba konsideris ke Zamenhof naskiĝis je la 11h25 atm, dum en tiu korektita mapo prezentita de Jorge das Neves li konsideris ke Zamenhof naskiĝis je la 10h56 atm. La kialon de tiu ŝanĝo mi ne scias, sed konsiderante la seriozecon kaj kompetentecon de samideano Saliba, mi konsideros por mia interpreta laboro tiun lastan version (la korektitan mapon).

## La mapo interpretita

En iu ajn astrologia mapo enestas pluraj informoj pri la koncerna persono aŭ aĵo. Mia interpreto ne intencas esti kompleta. Mi volas

nur elstarigi erojn de la mapo, konsiderante precipe konatajn faktojn de la Zamenhofa vivo.

## La Suno

Por la kono de la naskiĝdato de iu aŭ io, oni estas informita pri ties suna signo. Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro. Do li estis sagitariano. Interalie sagitariano estas persono, kiu subtenas noblajn ideojn kiel la universalan amon kaj mondan pacon. Tia estis Zamenhof!

En la mapo la Suno ankaŭ troviĝas sur la deka domo, kiu estas indiko ke li elstariĝos kaj famiĝos en sia medio. Zamenhof, kiu devenis de malriĉa familio kaj naskiĝis en malgranda urbo de Pollando, en 1959 estis deklarita de UNESCO kiel “granda personeco de la homaro”!

Krome la Suno troviĝas en konjunkcio kun Merkuro, indikante ke ni estas antaŭ “vigla pensulo”. Zamenhof ne nur kreis lingvon, sed ankaŭ elpensis Homaranismon! Tiu konjunkcio ankaŭ indikas ke la sukceso en la vivo dependas de siaj propraj klopodoj. Ĉu tio ne repondas al la realo?

La Suno estas en kvadrato kun Neptuno. Interalie tio povas indiki personon senteman al la suferado. Sed tiu aspekto ankaŭ signifas ke li en iu momento de sia vivo povas esti perfidita. Estas ĉies konata la Beaufronta epizodo en la vivo de Zamenhof!

## La Ascensia signo

Krom la suna signo, ni havas la ascensian signon, kiu rilatas al la horo de la naskiĝo. Laŭ tiu flanko Zamenhof estis amforano. “Justeco kaj frateco” estas vortoj, kiujn ni povas “alglui” al ĉiu amforano. Kiu ne memoras pri la Zamenhofa devizo “justeco kaj frateco inter ĉiuj popoloj”? Tutcerte tipa amforanta frazo! Krome sur la unua domo, kiu en la mapo estas tre ampleksa, oni trovas du aliajn signojn – Fiŝo kaj Ŝafo. Fiŝano ĝenerale estas sentema persono. Ĉu Zamenhof ne estis tia? Ŝafano estas iniciatema homo. Ĉu Zamenhof ne agis tiel plurfoje en la daŭro de sia vivo? Krome ŝafano ĝenerale estas homo plena de energio. Ĉu Zamenhof ne estis tia, laborante la tutan tagon en sia konsultejo kaj vespere sub la lumo de kandeloj laboris super E-aj aferoj?



## La Luno

La Luno en Urano montras personon kun “deziro esti utila al aliaj”, dum la Luno sur la sepa domo indikas ke la kunulino povos esti “sentema persono”. Krome la Luno estas en konjunkcio kun Saturno, indikante ke tiu kunulino povos esti respondeca persono. Ĉu ne estis decida faktoro por la apero de Esperanto la sentemo kaj apogo de Klara al la ideoj de Ludoviko?

## Aliaj interesaj informoj en la naskiĝmapo de Zamenhof

### Neptuno

Neptuno sur la unua domo kaj en la signo Fiŝo pliintensigas la sentemon de la persono. Krome indikas talenton por poezio kaj muziko. Ĉu la vivo de Zamenhof ne konfirmas tion?

### Urano

Urano en astrologio estas konata kiel simbolo de inventemo, originaleco kaj neordinareco. Kaj la tria domo estas interalie la domo de komunikado, parola kaj skriba. La ĉeesto de Urano sur la tria domo de la naskiĝmapo de Zamenhof estas tre interesa afero, ĉar mi pensas ke ĝi estas indiko ke li iamaniere kreos ion neordinaran rilate al komunikado. Ĉu Esperanto ne estas ĝuste tio? Krome en kelkaj astrologiaj manlibroj estas informo ke tiu pozicio de Urano estas signo de genieco kaj originaleco. Ĉu Zamenhof ne estis tia?

### Marso

La planedo Marso en astrologio signifas interalie kiamaniere ni utiligas nian energion. Marso estas en Skorpio, indikante ke la persono estas laborema kaj disĉiplinita, konscia pri la celoj atingotaj. La ĉeesto de tiu planedo sur la naŭa domo indikas ke temas pri homo kun firmaj opinioj. La aspektoj de Marso kun aliaj planedoj kvazaŭ konfirmas kaj pliintensigas tiajn kvalitojn: tre laborema (Marso kvadrato Jupitero), persistema kaj disĉiplinita (Saturno sesangulo Marso) kaj intensa neceso venki iun ajn defion (Marso opozicio Plutono).

## Konklude

En pluraj lokoj de la mapo oni trovas signojn pri la persistemo, preskaŭ obstinemo de Zamenhof. Luno kvadrato Urano, Ascensia signo en Amforo, Marso sesangulo Saturno, Saturno en Leono, Saturno kvadrato Urano. Fine valoras la penon elstarigi la pozicion de Jupitero en la astrologia mapo de Zamenhof: Jupitero en Kantono, indikante ke li estas bonkora, kompatema kaj protektema rilate al la familio; Jupitero sur la sesa domo, indikante ke labori estas plezurige kaj la rekompenco devenas de la servo al la aliaj; Jupitero trigono Neptuno, kiu indikas personon spiritualisman, religieman kaj kiu treege ŝatas helpi la aliajn.

Tiuj estis la ĉefaj ecoj de la naskiĝmapo de Zamenhof. Ekzistas kompreneble pluraj aliaj trovitaj de mi kaj tutcerte trovotaj de aliaj studemuloj de astrologio. Tial bv. konsideri ĉi tiun analizon nur plian kontribuon tiukampe.

*Aloisio Sartorato.*

*Informilo de Kultura Cooperativo de Esperantistoj, n-ro 41 nov/dec 2007 Río de Janeiro, BR*

## ■ Subvencio

## Apogo al E-bibliotekoj

**K**vin bibliotekoj ricevis subvenciojn de *Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen* je la suma valoro de 1250 eŭroj. La subvencioj estas donataj kiel libroj laŭ la dezirlistoj, kiujn la bibliotekoj sendis kun siaj petoj. Per decido de la estrarano de UEA pri kulturo *Claude Nourmont* kaj Ĝenerala Direktoro *Osmo Buller* estis subvenciitaj la bibliotekoj de la madagaskara *Itaosy Esperanto-Klubo* (125 EUR), en Ruslando *Sankt-Peterburga Esperanto-Societo "Espero"* (135 EUR), en Kolombio *Kolumbia Esperanto-Ligo* (190 EUR), en Kubo *Kuba Esperanto-Asocio* (200 EUR) kaj en

Argentino oni subvenciis al *Bonaera Esperanto-Asocio* (230 EUR).

Subvencioj de la Biblioteka Apogo estas disdonataj ĉiujare ekde 1997, kiam UEA ricevis mondonacon por tiu celo de ges-roj *Thorsen*, ambaŭ forpasintaj en la jaro 2006. Ĝis nun la fondaĵo disdonis subvenciojn por 14000 eŭroj. Petoj pri subvencioj en 2008 devos atingi la Centran Oficejon ĝis la 15-a de oktobro. Kun la peto oni sendu liston de dezirataj libroj, kiuj estu ordigitaj laŭ dezirindeco.

TTT-ejo dediĉita al la vivo kaj verkaro de *Poul Thorsen* (1915-2006) troviĝas je la adreso [www.poulthorsen.dk](http://www.poulthorsen.dk)

■ Informo: Ne nur por virinoj

## Solidareca mesaĝo el Hirosima por la Internacia Virina Tago 2008

**OSIOKA Taeko, kaj ŝia edzo agadas por Esperanto en urbo Hirosima, Japanio. En la 92-a UK ili ekspoziciis la 158 respondajn mesaĝojn el 50 landoj de Internacia Virina Tago 2007 en Hirosima, kaj en aliaj lokoj 5 fojojn. Ankaŭ ĉi-jare ili petas kunlaboron por la Internacia Virina Tago de UN 2008 en Hirosima.**

**E**stimataj, Karaj Sinjorinoj kaj Sinjoroj en la Mondo!

En la nomo de kunveno por la Internacia Virina Tago 2008 ni preparokomitato de 20 grupoj kaj municipo Hirosima sendas al vi ĉiuj elkore amikecan saluton.

Okaze de Internacia Virina Tago, en la 8-a de marto, ni havos kunvenon, spektos

dokumentan filmon "HIMEYURI (matenstela lilio)" kaj dancon kaj kanton de Okinavo. La filmo temas pri lernantinoj, viktimoj en la milito sur insulego Okinavo, kiu havas belan naturon kaj riĉan kulturon plejsude en Japanio.

En la dua mondmilito ĉe surtera batalo loĝantoj de Okinavo estis entiritaj. 94000 japanaj soldatoj kaj proksimume 150000 loĝantoj mortis, plej parte virinoj, infanoj, kaj maljunuloj.

Hodiaŭ en Okinavo sidas 75% de usonaj militbazoj en Japanio, kaj okupas 11% da tereno de Okinavo.

En la mondo daŭras bataloj kaj militoj, ĉiam unue malfortuloj estas distretataj perforte. Ni volas studi kia estis la faktoj en la batalo de Okinavo kaj plifortan povon por paco.

Ni samtempe havos ekspoziciojn de "Porpacaj Mesaĝoj de Virinoj en la Mondo", "Batalo en Okinavo", kaj simpozion pri "Partopreno de Virinoj en Politika Decido".

Ni virinoj en Hirosima kordeziras neniam plu ripeti teruran militon. Ni tenas la Japanan Konstitucion kun la 9-a artikolo: "La Japana Popolo, sincere deziras internacian pacon bazitan sur justeco kaj ordo, por ĉiam rezignas kaj militon, kio estas ekfunkcio de regnopotencoj, kaj minacon per armita forto aŭ uzon de armita forto, kiel rimedon por solvi internacian konflikton".

Por realigi la celon de la antaŭa paragrafo ĝi neniam tenas landan, maran kaj aeran fortojn kaj ankaŭ aliajn militfortojn.

Ni ne agnoskas la rajton de militado de la regno. Ni klopodu por paco kaj homaj rajtoj kun virinoj en la mondo.

Ni trans muroj de nacieco, religio, kaj kulturo kunlaboru manen mane, tenu reciproke por konstruado de paca 21-a jarcento.

Bonvolu doni al ni vian mesaĝon pri paco. Ni prezentos ĝin en la ekspozicio por la Virina Tago helpe de esperantistoj en la mondo.

S-ino NOBUMASA Tiekō, la Rerezentanto de la Komitato por Internacia Virina Tago 2008/ Municipo Hiroshima, kun organizoj de Socia Partopreno de Virinoj/de Japana Konferenco 2007/WE-Palaco/ Semi-palatinsk Projekto/de Lokaj Virinaj Organizoj /Kina Karavano / de Telkomunika

Industrio / de Bonfarto de Familio sen Patro (gubernia k. urba) / Novjapana Virina Asocio / Japana Medicina Laborsindikato / Savu Irakajn Infanojn / Patrino Asocio por Bonkvalitaj Libroj / Tutjapana Instruista Sindikato en urbo Hiroshima / Laborsindikato de Municipaj Oficistoj / Virina Demokratia klubo / YWCA de Hiroshima / Laborsindikato de Urbaj Oficistoj / Arko de Hiroshima / Gubernia Ligo de Patrinoj / Virina Sekcio de Emerita Sindikato.

Peranto de mesaĝoj por la kunveno:

OSIOKA Taeko. Retadreso:

[osioka@mail.goo.ne.jp](mailto:osioka@mail.goo.ne.jp)

Limdato: la 20-an de februaro.

Bv. doni al responda mesaĝo noton pri via nomo, aĝo, kaj okupo, urbo mi petas.

■ Informo: Virtuala enciklopedio

## Landaj Asocioj en Vikepedio

La libera interreta enciklopedio informas jam pri multaj Landaj Asocioj de UEA.

Sed bedaŭrinde per la artikolo “Landa Asocio” videblas ankoraŭ mankoj: ne ekzistas artikoloj ekzemple pri Nov-Zelanda E-Asocio, Esperanto-Ligo de Israelo kaj Bulgara E-Asocio, (aŭ kelkaj estas ne komplete informo). Ofte esperantistoj fakte jam havas taŭgajn tekstojn, aŭ povas rapide produkti ilin. Se vi bezonas helpon aŭ mem ne deziras envikipedigi tekston, spertaj vikipedistoj volonte faras tion por vi. Sendu la tekstojn provizore al mia adreso, mi petas.

*Ziko van Dijk; [zvandijk@gmail.com](mailto:zvandijk@gmail.com)*

*[http://eo.wikipedia.org/wiki/Landa\\_Asocio](http://eo.wikipedia.org/wiki/Landa_Asocio)  
Esperanto, januaro 2008, p. 13*

### ¿Socio de UEA?

Si desea abonar su adhesión a UEA puede contactarse con el Presidente de AEL, Sr. Alcides Wentinck. (Ver Anuncios)

## Anuncios

### AEL necesita su adhesión

Si Ud desea abonar su adhesión, colaborar con las tareas de AEL o adherirse a UEA envíe su aporte mediante depósito en Banco Francés, [sin costo], cuenta N° 147005789/3, a nombre de: Alcides Pieter Wentinck, DNI 93.709.394, Calle Libertad 3226 B1602DJD Florida, Vicente López Buenos Aires y luego indefectiblemente informe sobre dicha operación a:

[wanelec@sion.com](mailto:wanelec@sion.com)

Si desea colaborar con la edición y distribución de la revista *Argentina E-Vento* también puede enviar su contribución mediante el “Banco Patagonia”, depositando su aporte en “Caja de Ahorro” suc. 110, Sáenz Peña, cuenta N° 394101439, del Sr. Oscar C. Monge, [sólo se descontará \$7,27 como gasto bancario por depósito].

Rogamos siempre informar sobre su operación a esta redacción:

[rubendiaconu@yahoo.com.ar](mailto:rubendiaconu@yahoo.com.ar).

### Agradecimientos

Por las adhesiones y colaboraciones recibidas AEL agradece a: R. Calógero [Neuquén], M. Gunella [Salta], N. Monasterio [Buenos Aires], T. Stacul [Chaco].

La Redakcio kore dankas pro jenaj E-ricivaĵoj: Esperanto [NL], Heroldo de Esperanto [CH], La KancerKliniko [FR], La Espero [SE], Bazaro [RO], Kune [DE], Antaŭen [ES], Gaja Haveno [BR], Informilo de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo [PL], Femina [CH], Informilo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj [BR]. Se via sendo ne aperas Bv. informi al la Redakcio.

# Distraĵo

## Arabaj numeroj

Estis iu itala matematikisto, Leonardo Fibonatti (1170-1240), la unua diskoniganto de la arabaj numeroj en la Okcidento. Li konatiĝis kun la araba numersistemo dum vojaĝo al la nordo de Afriko.

## Plej vendita

Dum 10 jaroj, la 7 volumoj kun la aventuroj de Harry Potter, vendis 400 milionoj da ekzempleroj tradukitaj al 64 idiomoj. Nur la *Biblio* kaj *La Ruĝa Libro* de Mao Zedong vendiĝis plie. En la interreto estas 700 mil blogoj dediĉitaj al la fikciuloj kreita de J. K. Rowling.

## Ĉu @ ?

Ĉina patro volis bapti la filon per iu @ en la nomon. La Justico decidis, ke tio ne eblas ĉar la nomoj en la lando devas esti tradukebla al la mandarena lingvo.

*Gaja Haveno, Porto Alegre, BR.*

## Vidante la Pluvon

(Tra la fenestro de mia prisono)

Muroj el ŝtono apartigas min de la pluvo. Mi entendas miajn manojn tra la fenestro kaj provas tuŝi la ĉielon. Mi serĉas la akvon kiu sanigas, kaj la liberecon kiu alvenas en ĉiu guto.

Kvar grizaj muroj ŝtelis miajn sentojn. Malhela ĉambro ŝtelis miajn sensaciojn.

Se mi povus promeni sub la pluvo mi demetus tiun ĉi strian kostumon kaj miaj nudaj piedoj piedpremus la malsekan teron.

La gutoj el la pluvo ŝajnas larmoj, sed tiuj ĉi senfrukte akvumas la grizajn plankojn, kaj tiuj donas la vivon.

Kiam mi foriros? Ĉu mi povos foriri? Ĉu mi rezistos? Mi ne povas plu pensi.

Oni diras ke unu guto sur la kapo estas sufiĉe por atingi deliraĵon. Imagu tion kio faras mil falante sur mia karcero.

Kelka tago la pluvon ne gravos al mi. Kelka tago unu guto kaj mil estos egala. Mia korpo estos en prisono sed mia animo estos libera freneza spirito.

Jes, kelka tago.

*C. Devizia, Buenos Aires*

Redakcio de Argentina Esperanto-Ligo: Calles 119 y 122, AR-H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña, Argentino

Sr/a :

